





Mifi ĉe la marbordo


Nerajtigita traduko de “Nijntje aan zee” de Dick Bruna

2009-07-23

Diris Paĉjo unu tagon:
Mia Mifi kara,
ĉu vi venos en ekskurso
al la bordo mara?



Jes, respondis Mifi, certe
mi volonte venos,
kaj ĉar eble estos konkoj
mi sitelon prenos.



Bone, diris Paĉjo, do vi
sidu en la ĉaro,
kaj mi veturigos vin
rapide al la maro.



Forte tiris Paêjo; Mifi
en la êaro sidis,
êis jen ili antaũ si
la bluan maron vidis.



Haltis ili apud tendo.


Vidu, ni alvenis!

Diris Mifi al la patro:


Vi ja multe penis.




Mifi senvestigis sin,
sin vestis bankalsone.
Paĉjo ŝin gratulis: Vi ja
faris tion bone.



Faru do kastelon nun
kun sablomuro dika.
Poste mi kontrolos ĝin,
ĉu estas ĝi fortika.



Mifi faris muron do,
fosante plu senhalte.
Vi vidas ŝian kapon nur;
la muro staras alte.




Fininte la fosadon kaj
farinte la kastelon,
ŝi iris serĉi konkojn,
kunportante la sitelon.



Mifi kaj la patro poste
en la maron saltis.

La patro malsekiĝis, kiam
Mifi ege plaŭdis.




Resekiĝinte Paĉjo diris:

Nun mi vere pensas,

Ke ni iru hejmen nun, ĉar

Panjo nin atendas.



Domage! diris Mifi. Mi ne
lacas, și informis.
Tamen en la căaro baldaŭ
și profunde dormis.

